

# BELGA ESPERANTISTO



MONATA REVUO



*Oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista*

redaktata de VAN DER BIEST-ANDELHOF, direktoro ;

LÉON CHAMPY, FRANS SCHOofs kaj

OSCAR VAN SCHOOR.

## BELGA LIGO ESPERANTISTA

Antverpeno, la 10-IV-1911

*Estimata Samidean(in)o,*

Mi havas la honoron rememorigi vin pri la IIIa belga kongreso de Esperanto, okazonta en Charleroi, je la 4a-5a de junio 1911, kaj esperas, ke multaj belgaj kaj eksterlandaj gesamideanoj partoprenos en ĝi.

La Karloreĝa urbeŝtraro oficiale akceptos la gekongresanojn ; la kongresa kunsido (ĝenerala kunveno de la **Belga Ligo Esperantista**) estos tre interesa kaj la restado en Charleroi tre agrabla.

Ne nur la tiea ekspozicio estos granda allogo, sed ankaŭ tre ŝatiinda estos la ekskurso en la ĉarman regionon de Thuin, farota la morgaŭan tagon.

Por ebligi ĝustatempe la kunmetadon de la kongresa tagordo, mi petas la personojn, kiuj deziras pritrakti aŭ diskutigi temojn, min sciigi pri tio, antaŭ la 26a de aprilo.

Bonvolu akcepti, Estimata Samidean(in)o, mian tutkoran saluton.

La Prezidanto de la B. L. E.,

VAN DER BIEST-ANDELHOF.

## 7a internacia Kongreso de Esperanto

(ANTVERPENO, 20-27 de aŭgusto 1911)

En la marta numero de B. E. ni erare sciigis pri la organizado de la fakaj kunsidoj. La definitiva informo estas la jena :

Pri la tagordo de la laboraj kunsidoj de la kongreso oni sin turnu al la Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, *S-ro Generalo Sebert, 51, rue de Clichy, Paris*, antaŭ la 1a de junio 1911. Pri la organizo de fakaj kunvenoj, oni skribu senpere al la Loka Komitato, kiu preparos kunveneojn kaj difinos tempon por ili sur la programo.

— Sub la dato de la 20a de marto la Sepo dissendis sian unuan cirkuleron. Ĝi estas la resumo de la sciigoj

publikigitaj en la n-roj 1-6 de B. E. Ĉiuj esperantistaj revuoj estas petataj ĝin represi.

— Pri la literaturaj konkursoj ni rememorigas, ke ĉiuj esperantistoj povos partopreni en ĝi. La manuskriptoj devos esti alvenintaj antaŭ la 1a de julio ĉe la sekretario-kasisto; ili ne povos esti skribitaj de la aŭtoro mem, kaj devos porti la numeron de la konkurso kaj devizon, repetitan sur fermita koverto enhavanta la nomon de la verkinto.

*Varma alvoko estas favata al ĉiuj esperantistaj eldonistoj, administracioj de esperantistaj ĵurnaloj, esperantistaj organizaĵoj, aŭtoroj kaj ĉiuj bonvolemaj samideanoj, por ke ili aljuĝu, kiel eble plej baldaŭ, premiojn kaj difinu temojn.*

La ĝisnunaj favorantoj de la konkurso estas:

1. **Loka organiza komitato de la kongreso.** — *Historio de Esperanto*, ± 20 paĝoj, formato de B. E.; 1a premio: 100 frankoj = Sm. 40; 2a premio, 50 frankoj = Sm. 20.

2. **Redakcio de « Belga Esperantisto ».** — *Originala novelo* ± 12 paĝa, formato de B. E. — Premio: 50 frankoj = Sm. 20.

3. **Antverpena Grupo Esperantista.** — *Pri la utilo de Esperanto por la komerco; kiel enkonduki la uzadon de nia lingvo en la komercajn rilatojn*, 5 paĝoj, formato de B. E. Premio: 50 fr. = Sm. 20.

4. **La Verda Stelo.** — *Pri la utilo de Esperanto por la laboristoj; kiel enkonduki nian lingvon en la laboristaron.* — Premio: 50 fr. = Sm. 20.

5. **S-ro Frans Schoofs.** — *La malnova flandra pentrista skolo.* Premio: 30 fr. = Sm. 12.

6. **S-ro D-ro Pedro Ruiz Prieto**, Sevilla. — *Plej taŭga procedo kaj plej efikaj rimedoj uzotaj de la Esperantistoj kaj speciale de la Internaciaj Kongresoj, por atingi de ĉiuj Registaroj la oficialan starigon de la deviga instruado de Esperanto en la duagrada lernejoj.* Premio: 100 fr. = Sm. 40.

7. **Tutmonda Esperanto Anoncekspedo**, firmo Th. Anding, Berlin, S.W. 48. — *Verku efikan broŝuron pri la utilo kaj la agado de la T. E. A. (kun modelaj ekzemploj pri la plej bona uzo de la T. E. K.-laborfakoj).* Minimume 7 prespaĝoj laŭ monoformato. Premio: 12.50 fr. = Sm. 5 kontanta mono kaj por 12.50 fr. = Sm. 5 da Esperanto specialaĵoj.

8. **S-ro Oscar Van Schoor**, Antverpeno. — *Pri la batalo por la akiro de la lingvaj rajtoj en malgranda lando, ekz. Bohemujo, Kroatujo, Flandro, aŭ alia*, 5 paĝoj formato de B. E. Premio: 30 fr. = Sm. 12.

9. **Libera Penso**, internacia societo de esperantistaj liberpensuloj. — *Libera penso en la moderna literaturo.* Premio 25 fr. = Sm. 10.

10. **S-ro John P. Nix**, Eastbourne, Anglujo. — *Soneto, temo laŭvola.* Premio: 12.50 fr. = Sm. 5.

**Belga Esperantisto kaj Oficiala Gazeto** publikigos regule sciigojn pri la konkurso.

— La Urbeŝtaro de Antverpeno senpage permesis al la Sepa disponi la flandran Operejon dum la tuta kongresa semajno.

— Sciigojn pri loĝado k. t. p. oni trovos sur la dorsa flanko de la aligilo.

— La postkongresa ekskurso tra Belgujo daŭros de la 28a de aŭgusto ĝis la 2a de septembro. La vojirplano estas preta kaj aperos en la venonta n-ro de B. E.

**Van der Biest-Andelhof**, prezidanto; **O. Van Schoor**, vicprezidanto; **D-ro W. Van der Biest**, sekretario-kasisto; **Maria Posaer**, leŭtenanto **Fr. Dupont**, **Louis Ritschie**, **Frans Schoofs**.

— × × × —  
**Nomaro de la kongresanoj aligitaj antaŭ la 4a de aprilo 1911**

526. F-ino Metz, Maria, Hartmannstrasse, 38, Aachen (German.)  
 527. Chilard, Lionel, profesoro de Esperanto, 4, rue P. Bertin, Versailles (Franc.)  
 528. F-ino Dirksen, Julia Catharina, de Perponcherstraat, 71, den Haag (Holl.)  
 529. Van der Vet, Adriaan Cornelis, ŝtatoficisto, 10, Visschersdijk, » »  
 530. Moissenet, Léon, ĉefingenero de la Pontoj kaj Vojoj, 29 bis, faubourg du Moustier, Montauban (Franc.)  
 531. Belhoste, Léon, orumisto, 17, boulevard St Jacques, Paris »  
 532. Viratelle, Eugène, orumisto, 2, rue Ernestine, » »  
 533. F-ino Fielden, Helen, 17, Norwood Crescent, Southport (Lancash.-Angl.)  
 534. Lachlan, John M., instruisto, 71, Heaton Moor Road, Stockport (Chesh.-Angl.)  
 535. S-ino Tiard, 15, rue de la Réunion, Parc St-Maur (Seine-Franc.)  
 536. Serrat y Parés, Josep, konstruajkontraktisto, 55,2,2, Aribau, Barcelona (Katal.-Hispan.)  
 537. La Fontaine, Henri, senatano, advokato, prezidanto de la Internacia Pacifista Oficejo, Square Vergote, 9, Brussel (Belg.)  
 538. Pichon, René Charles, prezidanto de la Federacio de l'Junaj Esperantistoj, 142, boulevard du Montparnasse, Paris (Franc.)  
 539. F-ino Buchanan, Marian, Silverrae, Giffnock apud Glasgow (Skotl.)  
 540. S-ino Blondin, rentulino, 2, rue Rothschild, Nice (Franc.)  
 541. Plaut, 87, rue Didot, Paris »  
 542. S-ino Plaut, » » » »  
 543. Gourlay, John, kontisto, 451, Hale End Road, Highams Park (Essex-Angl.)  
 544. Sawyer, Arthur, komizo, 3, Finden Road, Forest Gate, London »  
 545. Buhlemann, H., Seumestrasse, 65, Leipzig (German.)  
 546. Herbst, Paul, Jahnstrasse, 36, » »  
 547. Youds, Charles J., desegnisto, 90, Westfield Street, St Helens (Lancash.-Angl.)  
 548. Ingham, H., 26, Hamilton Street, Bury » »  
 549. Cloupet, Joanny, industriisto, 175, cours Lafayette, Lyon (Franc.)  
 550. Elb, Leopold, rentulo, Blumenstrasse, 12, Kötzschenbroda-Dresden (German.)  
 551. S-ino Elb, » » » »  
 552. F-ino Junghanns, Käthe, Heinrichstrasse, 18, Weiser Hirsch » »  
 553. F-ino Lange, Annie, Fürstenstrasse, 12, » »

554. F-ino Lehner, Martha, kantistino, Pestizerstrasse, 12, Dresden (German.)  
 555. Leschke, Max, kolonelo-leŭtenanto, Weinbergstrasse, 102, » »  
 556. Sykora, Max, instruisto, Bischofsweg, 19, » »  
 557. Bontemps, Georges, staciestro, gare, Pannes (Sarthe, Franc.)  
 558. S-ino Bontemps, » » » » » »  
 559. Claudé, Albert, kantona voĵagento, Place Municipale, Ancerville (Meuse »  
 560. F-ino Mc Neillie, Margaret D, Morningside Road, 408, Edinburgh (Skotl.)  
 561. F-ino Millar, Elisabeth H., Howard Place, 14, » »  
 562. Robbie, James, librotenisto, Strathearn Road, 42, » »  
 563. F-ino Smith, Helen, kasistino, Hillside Crescent, 33, » »  
 564. F-ino Valentine, Nellie, Viewforth, 15, » »  
 565. F-ino Smith, Greta, maŝinskribistino, Muirpark, 69, Eskbank »  
 566. F-ino Matthews-Frederick, Jessie Frances, Gass, Glenluce »  
 567. F-ino Matthews-Frederick, Mary Margaret, » » » »  
 568. Fleury de la Ruelle, Marcel, Terrasson (Franc.)  
 569. Wiesner, Max, telegrafa oficisto, Elisabethstrasse, 95, Düsseldorf (German.)  
 570. Maertens, Albert, bankestro, honora prezidanto de la « Genta Grupo Esperantista », Kruisstraat, 9, Gent (Belg.)  
 571. Clegg, Harald, sekretario de la « British Esperanto Association », 133, High Holborn, London (Angl.)  
 572. F-ino Howlett, Annie B., Bracondale, 36, Norwich »  
 573. Pollen, John, kolonelo, Victoria Street, 3, London »  
 574. Pitton, James H., oficisto, 2, Stanley Street, Lindley, Huddersfield »  
 575. F-ino Fielding, Jenny, instruistino, 83, Hope Terrace, Wellhouse, Golcar, » »  
 576. F-ino Morton, Christina Martha Elizabeth, instruistino, 49, Mount Pleasant Street, Hill Top Road, Dalton, » »  
 577. Schepmans, Willem, estro de la Urba Socia Oficejo, Waterloostraat, 37, Antwerpen (Belg.)  
 578. Mulder, Herman, suboficejestro de la Publika Instruado, prezidanto de la Societo de Blindulprotektado, Ballaerstraat, 100, Antwerpen (Belg.)  
 579. S-ino Sutcliffe, Belgrave Street, 38, Burnley (Lancash.-Angl.)  
 580. F-ino Healey, A., Daisy Bank, Halifax Road, 31, Brighouse (Yorksh.)  
 581. D-ro Ostrovski, Ilja, kuracisto, Sumskaia, 47, Kharkoff (Rus.)  
 582. de Sousa-Lisboa, 10, rue Clauzel, Paris (Franc.)  
 583. Fischer, Tadeusz, fervoja oficisto, Teresystr., 38, Lwow (Galic.-Aŭstr.)  
 584. Willems, ekskonservisto de l'hipotekoj, St Jansvest, 18, Gent (Belg.)  
 585. F-ino Willems, » » » » » »  
 586. Demarteau, Henry, Willemsstraat, 1, » »  
 587. Loentjens, Camille, fabrikisto, Dampoortstraat, 24, » »  
 588. De Baets, Maurice, studento, Winkelstraat, 11, » »  
 589. F-ino Collin, Eugénie, Plezante laan, 95, » »  
 590. F-ino Schepens, K. L., Dierickxstraat, 14, » »

**AVIZO**

La gesamideanoj el Antverpeno kaj ĉirkaŭaĵoj, kiuj jam aliĝis al la **SEPA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**, estas petataj kunveni dimanĉon la 30an de aprilo, je la 11a matene, en la « Taverne Royale », Groenplaats (Place Verte), Antverpeno.

**LA SEPO POR LA SEPA** deziras fari al ili diversajn interesajn komunikojn.

**Protokolo pri la komitata kunveno de la B. L. E., okazinta en Bruselo la 27an de novembro 1910, en salono de la « Café des trois Suisses ».**

**S-ro Van der Biest-Andelhof**, prezidanto, malfermas la kunsidon je la 10<sup>h</sup> 1/4a matene.

Ceestas :

a) *Delegitoj de la ĝenerala kunveno* : S-ro L. Champy, F-ino M. Moreau (anstataŭanta S-ron Pastron Richardson) ; petis senkulpigon : S-roj Swagers kaj Van Schoor.

b) *Delegitoj de la grupoj* : S-roj Finet kaj Van der Biest-Andelhof (Antverpena Grupo Esperantista) ; R. Leseul kaj F. Schoofs (Verda Stelo, Antverpeno) ; Verbracken, anstataŭanta S-ron Van Gansen (Suda Lumo, Antverpeno) ; Clerbaut (Boom' a Grupo Esperantista) ; F-ino M. Posenae (Laboro, Borgerhout) ; F-ino B. Ledène kaj S-ro A. J. Witteryck (Bruga Grupo Esperantista) ; S-roj F. Mathieux (Bruse'a Grupo Esperantista) ; Petiau, anstataŭanta S-ron Sebruyens (Genta Grupo Esperantista) ; Landenne, anstataŭanta S-ron Thiry (Huy'a Grupo Esperantista) ; Delvaux (Karlorega Grupo Esperantista) ; Vatriquant (Verda Stelo, Lieĝo) ; Van de Stadt (Verda Flago, Mariaburg) ; Van Peteghem (Mehlana Grupo Esperantista) ; Lange, anstataŭanta S-ron Pirnay (Verda Stelo, Verviers) ; Parotte (Verviers' a Grupo Esperantista). Petis senkulpigon : S-rojn Albert, Relavisse, Rieniets, Nyssen kaj Verbeken.

S-ro D-ro W. Van der Biest, delegito de la Antverpena grupo « Fervoro », nur funkcios, kiam lia societo estos balotita.

I. **La Prezidanto** sciigas, ke la Antverpena grupo « Fervoro » petas aliĝon ; ĉar ĝia regularo estas konforma kun tiu de la Ligo, li proponas, ke la komitato akceptu tiun societeton.

**S-ro Finet** deklaras, ke li ne voĉdonos kontraŭ la proponata aliĝo, sed atentigas la komitaton pri la estonta danĝero de la troeco de grupetoj ekzistantaj en la sama urbo. La kunsidantaro esploras atente tiun demandon kaj akceptas unuvoĉe Fervoro'n kiel aliĝintan grupon.

II. **S-ro Champy**, ĝenerala sekretario, legas la protokolon pri la lasta kunsido, kiun la kunsidantaro aprobas. Rilate al la kunmetado de la juĝantaro de la ekzameno pri kapableco, li esprimas la deziron, ke de nun, la efektivaj membroj de tiu juĝantaro estu elektataj inter la aldonitaj anoj. Akceptata.

III. **S-ro Van der Biest-Andelhof** donas kelkajn klarigojn pri la organizado kaj la agadoj de la VIIa internacia kongreso, okazonta en Antverpeno, dum la monato aŭgusto 1911 :

Dum la Barcelona kongreso S-ro Van Schoor kaj li mem estis unuvoĉe elektataj kiel membroj de la Konstanta Kongresa Komitato, kaj sekve komisiataj por estri la organizacion de la Sepa. Plenumante sian mandaton, ili faris alvokon al la sindono de kelkaj Antverpenaj samideanoj, kaj starigis komitaton, kiu, ĉar ĝi enhavas sep membrojn, alprenis la nomon « La Sepo por la Sepa ». Tiu komitato konsistas, krom la du komisitoj de la K.K.K., el F-ino Posenae, S-roj Dupont, Ritschie, Schoofs kaj D-ro W. Van der Biest ; ĝi elektis S-ron Van der Biest-Andelhof kiel prezidanton, S-ron O. Van Schoor, kiel vicprezidanton kaj S-ron D-ron W. Van der Biest

kiel sekretarion-kasiston. Post ne longe la K.K.K. enoficigis la Sepanojn, ĝi aprobis la fiksitajn datojn (27-27 aŭgusto) kaj la kotizon (5 Sm).

La VIIa kongreso estas nek Antverpena, nek belga, sed internacia. Tamen la loka organiza komitato estas Antverpena, kompreneble. Efektive la Sepanoj devas kunveni ĉiusemajne, baldaŭ pli multfoje, eĉ ĉiutage. Ili devas interrilati kun la lokaj publikaj estraroj, organizi akceptojn kaj festojn en la kongresa urbo; plie, ili devas prizorgi la loĝadon kaj la nutradon de la kongresanoj. Specialaj subkomisioj nuntempe ne ankoraŭ povas utili al la Sepoj; post nelonge tamen ĝi petos la kunhelpon de ĉiuj kongresanoj de Antverpeno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ĝi ankaŭ sin turnos al la tuta belga samideanaro kaj petos ĝian subtenon kaj kunlaboradon por sukcesigi la postkongresan ekskurson tra Belgio.

Finigante, S-ro Van der Biest invitas la ĉeestantojn, ke ili ne prokrastu aliĝi la kongreson, por ke la Sepoj ĝustatempe eksciuj, kiujn financajn rimedojn ĝi proksimume povos disponi kaj por eviti la konfuzon, kiun naskas la lasthora aliĝo de amaso da kongresanoj.

IV. **F-ino Posenaer** proponas forigi la agkondiĉon el la regularo pri profesora kapableco. Post mallonga diskutado la propono estas malakceptata.

V. Pri la pligrandigo de la nombro de la delegitoj de la ĝenerala kunveno la Prezidanto, kiu intencis fari proponon laŭ tiu senco, ne insistas. **S-ro Schoofs** esprimas la deziron, ke la ĝenerala kunveno ne plu delegu specialajn anojn. **S-ro Champy** rimarkigas ke la cirkonstancoj povas postuli kelkfoje, ke en la komitato de la Ligo kunsidas aliaj membroj ol la delegitoj de la grupoj. La **Prezidanto** aprobas tiun rimarkon. Fine estas decidate pristudi la aferon, kaj ĝin rediskuti dum alia kunveno.

VI. **La Prezidanto** rimarkigas, ke la publikado de speciala bulteno por la ĵurnalistaro estas tre dezirinda, sed ĝis nun la nesufiĉeco de niaj financaj rimedoj tion malhelpis. **S-ro Witteryck** prezentas presigi tiun informilon, senpage, dum unu jaro, kondiĉe ke la Ligo pagu la poŝtelspezojn. La kunsidantaro varme aplaudas tiun novan pruvon de sindono de S-ro Witteryck, kaj la Prezidanto esprimas al li, en la nomo de la ĉeestantoj, tutkoran dankon.

VII. **S-ro Van der Biest-Andelhof** donas detalojn pri projekto, kiu povas grandparte savi la financon krizon de la Ligo. Estas la « Soldo por Esperanto », kiu, kvankam en malfavoraj cirkonstancoj, jam pligrandigis niajn enspezojn po 60%. Se ĉiuj esperantaj grupoj bonvolus serioze praktiki la sistemon, nia budĝeto baldaŭ atingos centojn da frankoj. S-ro Van der Biest citas la artikolojn de *Franca Esperantisto*, *Le Monde Espérantiste* kaj *Svisa Espero*, kiuj varme rekomendas le enkondukon de la « Soldo ».

**S-ro Schoofs** kaj aliaj delegitoj interŝanĝas ideojn pri propagandaj rimedoj; tiuj ideoj estos diskutataj dum sekvanta kunsido.

VIII. La kunsidantaro elektas kiel honoran membron de la B. L. E. S-ron D-ron R. Van Melckebeke, kiel atesto de liaj grandaj servoj al la esperanta movado en Belgio, kaj dankeme rememoras, ke li estas la ĉefa fondinto de nia ligo.

IX. **La Prezidanto** sciigas, ke dum la decembra monato ekzameno pri profesora kapableco okazos en Gento. Ĉar F-ino

Moreau petas specialajn kondiĉojn por unu kandidato, la Prezidanto petas ĝin, ke ŝi bonvolu sendi al li raporteton pri tiu demando.

X. La kunsidantaro kunmetas por la jaro 1910-1911 sian estraron jene:

Prezidanto: S-ro Van der Biest-Andelhof;

Vic-prezidantoj: S-roj Witteryck kaj Richardson;

Ĝenerala Sekretario: S-ro L. Champy;

Kasisto (pro eksigo de S-ro Van Schoor): S-ro L. Delvaux.

La kunsido finiĝas je la 13a h.

La ĝenerala sekretario,  
LÉON CHAMPY.

## KOMUNIKO DE D-ro L. L. ZAMENHOF (1)

### Pri mia rilato al la firmo Hachette

Antaŭ pli ol tri jaroj kelkaj personoj faris aferon, kiun mi ne povis aprobi. De tiu tempo oni komencis senĉesan serion da atakoj kontraŭ Esperanto kaj kontraŭ mi persone. Dum pli ol tri jaroj mi pacience legis ĉiujn insultojn kaj malverajn akuzojn, kaj mi silentis; verŝajne mi ankaŭ plue silentos, ĉar mi estas trop fieraj kaj havas ankaŭ tro malmulte da libera tempo, por defendi min kontraŭ diversaj elpensoj de personoj, kiuj scias tre bone, ke ili diras malveron aŭ prezentas faktojn en malĝusta lumo kaj kiuj post unu refutita malĝustajo baldaŭ elŝovas dek aliajn.

Nur pri unu akuzo mi decidis nun doni malgrandan klarigon, ĉar mi konvinkigis, ke tiu akuzo trovis kredon eĉ ĉe personoj bonintencaj. Mi volas paroli pri mia rilato al la firmo Hachette.

Oni penis kredi, ke Esperanto nepre bezonas reformojn, ke la esperantistoj tion komprenas, sed nur mi pro iaj *personaj motivoj* kontraŭstaras. Kvankam eĉ nun ankoraŭ oni tion ofte ripetas, la akuzantoj tamen scias tre bone, ke tio estas absoluta mensogo. Ĉiuj komprenas, ke plenan perfekt-econ de Esperanto neniu dezirus tiel forte kaj sincere, kiel mi, ĝia aŭtoro; ke se troviĝus bonaj homoj, kiuj grandanime prenis sur sin la plibonigon, mi povus esti nur tre dankaj al ili, kiel patro estus tre dankaj se bonaj homoj volus senpage perfektigi kaj feliĉigi lian profunde amatan infanon, la revon de lia tuta vivo. Ĉiuj scias tre bone (ĉar tion distrumpetis miaj akuzantoj mem), ke kelkajn fojojn, kiam mi opiniis, ke venis la ĝusta tempo por fari revizion de Esperanto, mi mem elpaŝis kiel iniciatanto (kompreneble, en formo lojala); sed kiam mi konvinkigis, ke tiu alportos al nia afero nur

(1) El la februara numero de la *Oficiala Gazeto Esperantista*.

malbonon, mi retiris min malgraŭ ke min, neriĉan kuraciston oni penis allogi per tre granda sumo da mono, kiu permesus al mi tute forjeti mian profesion, vivi tute oportune kaj feliĉe, kiu liberigus min de ĉiuj zorgoj pri la morgaŭa tago kaj pri la estonta sorto de mia familio kaj kiuj permesus al mi fordoni min plene kaj ekskluzive al miaj amataj idealoj (1).

Ĉar sekve ne al ĉiu oni povas facile kredigi, ke mi kontraŭbalalas reformojn pro *persona oportuneco*, tial oni uzas alian rimedon: apogante sin sur iam aperinta famo pri ia mistera kontrakto kun Hachette, oni skribas en libroj, gazetaj artikoloj kaj privataj leteroj ke mi rifuzis reformojn tial, ke mi « estas ligita kun la firmo Hachette ». Kun plej senhonta konscienco oni rakontas, ke mi vendis Esperanton al Hachette, ke Esperanto estas monopolo de tiu firmo, k. t. p...

Sinjoroj! Se iu el vi iam volis lerni Esperanton, aŭ instrui Esperanton, aŭ eldoni ian verkon en aŭ pri Esperanto aŭ fari ian alian uzon de Esperanto, kaj mi aŭ la firmo Hachette malpermesis al li tion, — li elpaŝu kaj akuzu min publike! Vi scias tre bone, ke la rakontoj pri la venditeco de Esperanto al Hachette estas malnobla mensogo; vi scias tre bone, ke pri la lingvo Esperanto ĉiu el vi havas tute kaj plene tiujn samajn rajtojn, kiujn havas mi aŭ la firmo Hachette; vi konas tre bone la « misteran kontrakton », ĉar mi neniam faris el ĝi ian sekreton. Pri tiu kontrakto mi povus rakonti al vi kelkajn interesajn aferojn, se mi volus imiti la agadon de niaj kontraŭuloj kaj nigrigi personojn, nur pro tio, ke ili apartenas ne al nia partio. Nun mi nur ripetos al vi tion, kion ĉiuj scias, t. e. la tuta terura, mistera kaj krima kontrakto konsistas sole kaj ekskluzive nur en tio, ke miajn personajn librojn (ne gazetajn artikolojn aŭ ion similan, sed ekskluzive nur *librojn*) mi promesis publikigi ĉiam per la firmo Hachette (2)!

(1) Estas al mi tre malagrade tuŝi tiun historion, pri kiu mi nun la unuan fojon parolas publike. La legantoj pardonu min, ĉar la cirkonstancoj *devigas* min tion fari. La propono de la mono ne estis ia malnoblaĵo de la flanko de la proponintoj ĉar ili havis la plej bonan intencon; mia rifuzo ne estas ia herooĵo de mia flanko ĉar aĝi alie mi ne povis. Tial mi al neniu parolis pri tiu afero, kaj la unuan fojon mi rakontis pri ĝi private kaj nur unu jaron post la fakto, kiam oni faris al mi riproĉon, ke mi estas konservativa « pro financaj motivoj ».

(2) La rakontoj pri tio, ke mia kontrakto malpermesas al mi publikigi artikolojn en aliaj gazetoj krom la « Revuo », estas simple fantaziaĵo. Mi promesis al la direktoro de la « Revuo » (libere, sen ia kontrakto), ke mi en ĉiu numero de lia organo publikigos parton de miaj tradukoj; sed mi neniam promesis al li (kaj tion li ankaŭ neniam diras) publikigi artikolojn *nur* en lia organo. Kiu el vi povas kun pura konscienco akuzi min pro tio, aŭ kiu el vi iom suferas de tio, ke en la tre malmultaj horoj, kiujn mi devus uzi por ripozo aŭ por mia familio, mi faras tradukojn por la « Revuo », kiu pagas al mi por tiuj tradukoj kaj per tio donas al mi la eblon plibonigi la vivon de mia familio kaj venadi ĉiujare al la kongresoj?

Jen estas mia tuta krimo! Eĉ se tiu kontrakto prezentus por mi ian oportunajon, — kiu havas la rajton akuzi min pri tiu afero, kiu estas ja mia afero pure persona kaj neniom tuŝas Esperanton nek la esperantistojn? Sed miaj akuzantoj scias tre bone, ke la kontrakto (kiu ligas nur min, sed neniom ligas la firmon) tute ne estas ia oportunaĵo por mi, ke longe mi ne volis ĝin subskribi, ke se mi flne ĝin subskribis, mi faris tion ne pro mia profito, sed nur por fari servon al Esperanto, kiu tiam tre bezonis la apogon de ia solida firmo. Sekve se ekzistas en la mondo iu, kiu havus la rajton plendi pri tiu kontrakto, tio estas nur mi, *mi sola*. Sed mi ne plendas, ĉar mi scias tre bone, kiajn grandajn servojn la firmo alportis al nia afero.

Oni diras, ke Hachette pagis al mi por mia kontrakto ian grandan sumon da mono; oni diras, ke mi ricevas procenton de ĉiuj eldonoj de Hachette, ke mi sekve havas intereson zorgi pri la profitoj de la firmo, k. t. p. Ĉio ĉi tio estas *malnobla mensogo*. Kiel al ĉiu alia aŭtoro, tiel ankaŭ al mi Hachette pagas nur por miaj *personaj* verkoj; sed neniam mi prenis de Hachette ian apartan pagon, ian donacon aŭ salajron; de la libroj eldonataj de Hachette, se ili ne estas verkitaj de mi mem aŭ kun mia kunlaborado kaj ne portas malkaŝe mian propran nomon, mi neniam ricevas eĉ unu centimon. Eĉ kiam por miaj propraj verkoj (presataj en la « Revuo ») Hachette en la komenco difinis al mi tro grandan pagon, kiujn la enspezoj de la « Revuo » ne povis kovri, mi baldaŭ poste *per mia propra volo* tion rifuzis (simple pro tio, ke mi ne volas esti ies morala ŝuldanto) kaj mi postulis, ke Hachette prenu al si la rajton eldoni tiujn verkojn, senpage, en formo de libroj en tia nombro da ekzempleroj, ke ĉiuj elspezoj kovriĝu.

Kion do suferas la Esperanta afero de mia fama pure persona kontrakto? Per kio ĝi povas influi la iradon de la Esperanta afero? Se mi volus akcepti reformojn fari, tian aŭ alian agon, skribi tian aŭ alian artikolon, — per kio Hachette povus min malhelpi aŭ influi? Se mi dezirus publikigi ian libron, kiu ne estus oportuna por Hachette, la firmo havus nur la rajton ne eldoni ĝin, nenion pli; sed ĉiuj scias, ke tiam mi ja tre facile trovus alian firmon, kiu eldonus mian libron kun granda plezuro.


Miaj kontraŭuloj scias tre bone, ke se mi volus aliĝi al la reformistoj, ne sole neniu kaj nenio povus min malhelpi, sed mia situacio tiam estus multe pli bona, ol nun. Se ili ĉion sciante, tamen rakontas al la mondo, ke mia sintenado en la reforma afero estas kaŭzita de mia « ligiteco kun la firmo Hachette »; ilin juĝu ilia propra konscienco.

L. L. ZAMENHOF.

# KARLOREĜO

(CHARLEROI)

Post kelkaj semajnoj malfermiĝos la nacia ekspozicio de Karloreĝo. Okaze de tiu grandega elmonro de la industriaj kaj socialaj perfektigaĵoj en nia patrujo, la Karloreĝa esperantista grupo organizos, je la 4a-5a de junio (Pentekostaj festoj) la **trian belgan esperantistan kongreson**, kiu espereble kunigos sur la bordoj de la Sambro la plimulton de la belgaj fervoraj samideanoj. La najbaraj francaj samideanoj ankaŭ bonvolos interfratiĝi kun la belgaj kamaradoj kaj montri, ke la esperantismo ne konas landlimojn.



La enirejo de la urbo

da malpuraj kamentuboj; tie nek montriĝas verdaj arbaroj vivigataj de gajaj birdkantoj, nek ekfloras naturaj produktaĵoj en alridantaj kamparoj. Ne, Karloreĝo ne estas vizitinda!

Ho ve! Se antaŭjuĝoj tro ofte regas kaj direktas la homajn ideojn, tio estas vera rilate al la preparolita opinio pri Karloreĝo. Nia urbo, kiu kalkuias proksimume 28,000 enloĝantojn, estas la centra loko de multnombraj komunumoj, realaj antaŭurboj, kune enhavantaj pli ol kvarcent mil loĝantojn. Montigny, Couillet, Marcinelle, Marchienne, Dampremy, Jumet, Gilly k. a. formas nur unu grandan homan formikaron, kies




La Sambro

Kiom da Belgoj eble neniam vizitis nian regionon, dirante: « Karloreĝo, kun siaj nigraj ĉirkaŭaĵoj, ne estas vidinda! Tie la printempo kiel la vintra ĉielo ĉiam kovriĝas per malhelaj, malsanigaj malĝojaj nuboj, kiujn senĉese vomas centoj

tutan vivon oni povas resumi per la vorto *laboro*. Kiam, je vespera horo, la promenanto haltas unu momenton sur la plataĵo—nune kovrata de la ekspoziciaj konstruaĵoj—kiu apartigas la Nordan de la Suda parto de la urbo;


kiam li iom ĉirkaŭrigardas tra la vasta horizonto etendiĝanta ĉiuflanke, li pro mirego revas pri la giganta penado, kiu vivigas



La soldatejo

tiun amasegon da laborejoj, — li sentas kvazaŭ la regulan batadon de grandega homa koro. Li haltos kaj revos, kaj eble, en sia sentema animo, li komprenos la signifon de tiuj seninterrompaj klopodoj. Ĉar ĉiu tera regiono havas sian specialan karakteron, Karloreĝo ankaŭ posedas originalan ĉarmon, kiun sentos tiuj, kiuj konsideras naturon kaj homaron el iom pli alta vidpunkto.

Feliĉaj popoloj, kiuj ne havas historion! Nia urbo havas historion, ne ampleksan certe, sed sufiĉe movplenan, por ke ĝi konatiĝu kun malfeliĉoj kaj suferado. Ĝia deveno estas



La gendarmejo

malgrava vilago, nomita Charnoy. La hispana reĝo Karolo II, en la jaro 1666, ordonis konstrui tie fortikajon, kiu, pro sia fondinto, ricevis la nomon Karloreĝo (Charleroi). De 1667 ĝis 1794 ĝi multfoje vidis antaŭ



La duagrada lernejo por fraŭlinoj

franca, hispana, aŭstria kaj holanda jugo, ĝis kiam ĝi fine trovis pacon kaj kvieton sekve de la fondo de la belga memstareco. Ĝiaj fortikajoj definitive estis forigataj en 1868. La lastaj postsignoj de la pasinta militskuita tempo antaŭ nelonge malaperis sub la iloj de la terfosistoj.

Ni reeniru do la nuntempo vivon! Ni aŭskultu la tute malsimilan lingvaĵon de la hodiaŭaj aferoj! El la ĉirkaŭkuŝantaj valoj supreniĝas la stranga eĥo de konfuza movado, tra kiuj ĉiuj minute resonas la bruego de rapidantaj vagonaroj, akrasonaj aŭ malklaraj fajfiloj, peze spirantaj maŝinoj. De tempo al tempo la vasta scenejo subite enlumigas per iom funebra lumo; la tuta ĉielo terure enflamiĝas per malhelruĝa rebrilo: laborejoj, kamentuboj, terkarbamasoj, ĉi tiuj atestantoj de malfacila, nelaciĝanta laboro, aperas en sia malgaja, sovaĝa grandeco. La alrigardanton ekkaptas neesprimebla impresio.




La Reĝa ateneo

l' mondo.

La riĉeco de ĝiaj ĉirkaŭaĵoj kompreneble rebrilas sur la ĝeneralan aspekton de la urbo kaj sur la vivmanieron de ĝia enloĝantaro.


Dum la lasta kvarono de centjaro nia urbo mirinde plivastiĝis kaj plibeliĝis. Kiam la vizitanto eliras la bruan stacidomon, traŭrante la larĝan antaŭplacon, kiu, dum la sunĝuiga parto de l'jaro aperas kiel alridanta florigardeno, kaj trapasinte la turnan ponton de la ŝipkanalo, li tuj troviĝas en la plej



La Suda stacidomo

brua interkomunikaĵa kvartalo. Aro da riĉaj komercejoj kaj movplenaj kafejoj atestas, ĉe la plimulto de la urbanoj, sufiĉegon da mono rapide gajnita kaj — bedaŭrinde — sammaniere elspezata. Laŭirante la angulon de strato, la ekskursanto ekvidas la elegantan aliron de la Komerca Borso. Ho! kia diligenteco! Interesplena estas la vidaĵo, precipe ĉiulunde, kiam multego da industriistoj kaj komercistoj tie kuniĝas pro siaj aferoj. Je tiu okazo la tuta «Malalta Urbo» pli ol kutime febrigiĝas. La bela turo de la nove konstruita ĉefa telegrafejo ŝajnas miri


pro tiu neordinara movado sur la «Placo de l'Sudo». Transpasinte la malnovan ponton, sub kiu la Sambro forpuŝas siajn akvamasojn, kaj suprenirinte la «Straton de l'Monto», la promenanto iom haltas sur la longa per arboj ornamita bul-



La Urbdomo

vardo Audent, kun larĝaj krucestratoj. Tie li vidas la masivan juĝpalacon, kies enirejon beligas du gigantaj bronzaĵoj: li vizitos la kokete aranĝitan kaj zorge konservatan Parkon, ne forgesante promeni siajn okulojn sur multnombrajn privatajn kaj publikajn konstruaĵojn, inter kiuj estas ĉefe rimarkindaj la Reĝa Ateneo kaj la kolegio de la Jesuidoj.

Iom post iom li atingas la centran urbon, la urbo de la vera Karlorega popolo. Nek nur je grandaj festotagoj, sed eĉ je ordinaraĵoj okazintaj, la fremdulo kiu kuraĝas trapuŝi la densan amason, ĉeestos la fenomenon de la plej stranga interrenkonto de homoj. Tie kuniĝas la laboranta enloĝantaro. Tie estas, ĉefe dimanĉe, la rendevuo de la antaŭurbanoj, serĉantaj diversspecajn amuzojn laŭ sia ne ĉiam rekomendinda



La Kanalo de la Sambro

sed vere originala idealo, kaj malavare elspezantaj sian dek-kvartagan salajron.

Al industrio kaj komerco Karlorego ŝuldas sian prosperecon. Tiuj du neelĉerpeblaj fontoj de riĉeco karakterizas ĝian vivon, ĝiajn kutimojn kaj ideojn. Pro tiu kaŭzo estas neeviteble, ke ĝia plej respektigata dio estas **Mono**. Mono estras la mondon, kaj precipe la Karloregan kunloĝantaron.

Aliflanke, nia urbo ankaŭ ne estas ŝparema, kiam ĝi povas favori filantropajn entreprenojn. Sufiĉas, ke ni citu la multnombrajn loĝejojn de la nova malsanulejo kaj la lernejon por kripluloj. Krom la monumentaj konstruaĵoj, supre preparolitaj, estas speciale citinda la nove fondita «Universitato de la Laboro», kies granitaj kolonoj fiere altiĝas super la ĉirkaŭanta laboranta regiono. Malavaraj publikaj klopodoj sukcesis starigi modelajn instituciojn, kies celo estas ĉiam disvastigi teoriarajn kaj praktikan instruadon inter ĉiujn klasojn de la socio kaj sincere plialtigi la tutmondan famon, kiun jam akiris la scienco de niaj inĝenieroj kaj la profesia lerteco de niaj laboristoj.

Proksime de l'Universitato kaj, etendiĝante ĝis la vasta ebenaĵo, kiun aliflanke ĉirkaŭas vastaj kazernoj, ekstaras iom post iom la belegaj kaj imponantaj konstruaĵoj de la nunjara ekspozicio.

F. WAGNER.

*En la maja numero de B. E. aperas artikolo pri la Ekspozicio kaj la projektita postkongresa ekskursio.*

## Unua universala kongreso de la rasoj

La 26-29an de julio okazos en la universitato de Londono internacia kongreso de ĉiuj rasoj. La celo de tiu ĉi kongreso estas diskuti, laŭ la modernaj scienco kaj konscienco, la ĝeneralajn rilatojn inter la tiel nomitaj blankaj popoloj kaj la tiel nomitaj koloraj popoloj, por atingi inter ili pli plenan interkomprenon.

La ideo de tiu ĉi kongreso eliris de Felix Adler, profesoro de socia etiko ĉe la kolumbia universitato de Novjorko. La unua propono estis farata en konferenco de la internacia etika unuiĝo en Eisenach (Germanujo) en julio 1906.

Kvin jarojn post tiu konferenco — do en julio 1911 — la projektita kongreso efektive okazos.

Oni sukcesis varbi por ĝi plej eminentajn reprezentantojn de registaroj, de internaciaj societoj, de universitatoj, ŝtataj kaj privataj institucioj, el preskaŭ ĉiuj landoj. Mirinda rezultato por tiu, kiu scias, kian rolon havas la rasaj diferencoj en la politikaj rilatoj de la landoj. La angla ministraro de de la eksterlandaj aferoj mem transsendis la invitojn al ĉiuj aliaj grandaj potencoj.

Oni zorgis, ke la ĉefaj demandoj de ĉiu raso aŭ popolo estu pritraktataj de unu el ĝiaj plej meritplenaj delegitoj.

Kvindek eminentuloj verkis raportojn, formante sciencan verkaron pri la ĉefaj rasaj demandoj. Hinduoj havas unue la parolvicon. Sekvas reprezentantoj de ĉiuj popoloj, de Hinujoj, Japanujo, Turkujo, Persujo, kc. kc. — Oni verkis raportojn pri la geografiaj kaj ekonomiaj kondiĉoj de la rasa vivo, pri la rolo de lingvoj, de religio, de moroj; pri la situacio de la

virinoj, pri interrasaj geedziĝoj; pri la ĝeneralaj kondiĉoj de la progreso en ĉiuj landoj; pri la paca kunligo de la popoloj per la grandaj eltrovoj, komerco, industrio, poŝto, telegrafo, komunikiloj, vojaĝoj; pri internaciaj asocioj, leĝoj kaj institutoj; pri elmigrado kaj ĝiaj ekonomiaj kaŭzoj, kaj pri internaciaj financaj rilatoj.

Oni speciale raportos pri la internacia moralo, la traktado de dependaj popoloj, pri la misioj, pri la komerco je alkoholo kaj opiumo, pri la situacio de la junuloj, pri la negroj en Afriko, pri la negroj kaj indianoj en Ameriko, pri la Hindoj kaj pri la mestizaj rasoj.

Oni predikos la respekton, kiun la blanka raso ŝuldas al la aliaj rasoj.

Oni submetos al la kongreso pozitivajn proponojn por kuraĝigi la interrasan amikecon: krei internacian tribunalon, plivastigi la agadkampon de la Haga konferenco, instigi la gazetaron al la internaciaj ideoj, instruigi la infanojn en la lernejoj, ke ili amu la infanojn de la aliaj rasoj; kuraĝigi la kreon de monda asocio por internacia amikeco.

Mankas nur Esperanto: jen Zamenhof verkis raporton pri internacia lingvo.

Neniam venis okazo, kiu tiagrade realigis la internan ideon de Esperanto, neniam venis okazo tiel grava por decidi ĝian venkon.

La kongreso en Londono estos malfermata al ĉiu loĝanto de la terglobo, kiu pagas la kongreskarton. Tiu kiu ne povas veni persone, povas, kiel neaktiva ano, mendi la dokumentojn de la kongreso. S-ro G. Spiller, ĝenerala sekretario, (\*) kiu sendos al ĉiu, kiu ĝin petos, detalan programon, sciigis, ke la multnombra partopreno de Esperantistoj estas tre favore konsiderata; pri la aranĝoj farotaj ni scios pli detale dum la venontaj monatoj.

Restas la demando, ĉu la okazo de tiu ĉi kongreso ni estos iel ĝena aŭ malhelpa al la sukceso de la VIIa kongreso de Esperanto en Antverpeno?

Neniel!

Unue nia kongreso ja ne havas nur propagandan celon, sed ĝi kunigas ĉiujn kiuj volas vidi siajn samlingvajn amikojn, travivi pure Esperantajn tagojn, plivivigi nian lingvon per la uzado kun fremdlandanoj, konatiĝi ili mem kun la bel-eco, la moroj, la popolo de nova lando. Ĝi konsistas unuflanke el la festoj, kiuj, kvankam ne sufiĉe sciencaj por kelkaj el niaj teoriemuloj, tamen estas necesaj kaj valoregaj, se efektive, nia lingvo volas esti vivanta lingvo, per kiu lernas esprimi sin ne nur la intelekto, sed ankaŭ la koro.

(\*) 63, South Hill Park, Hampstead, London.



Sed nia kongreso havas ankaŭ gravan signifon en la organiza progreso de nia afero. La fakaj societoj, kiuj suferis pro la Barcelonaj malkvietaĵoj, kiuj estis disigitaj per la « elmigrado » de la Sesa, en tiu ĉi jaro denove estos forte kunigataj. La internacia konsilantaro konvinkos nin pri sia vivo, la Universala Esperanto Asocio estos denove diskutata, kaj ni faros novan paŝon al ĝenerala internacia organizo, bazita sur Esperanto.

La stranga simileco en tio kion ni volas per nia kongreso, kaj tio kion volas la Londona kongreso, devigas nin, kunigi la du grandajn kampojn de ideoj.

Ni sendu reprezentantojn al la kongreso en Londono, por ke ili helpu Zamenhof kun lia projekto. Ni faru Esperantistan ekspozicion, ni disdonu prospektojn kaj instruigajn broŝurojn, kaj kiuj ne povas ĉeesti, sendu poŝtkartojn. Ni kuniĝu kun ĉiuj, kiuj interesas, por diskuti la rimedojn, kiel Esperanto povas esti progresigata en la diversaj landoj, por bone koni la malhelpojn, kiuj ĝin kontraŭstaras en kelkaj el ili; ni parolu pri la klopodoj faritaj jam de ni por efektivigi tutmondan interrasan ligan, pri la transformoj, kiujn niaj organizaĵoj bezonus por esti konformaj al la celo. Ni varbu ilin al niaj fakaj societoj, kiuj ne konas rasajn diferencojn. Montru ni al ili per la fakto, ke Esperanto estas vivanta lingvo, ke ni estas en plena progreso, kaj ke tiuj eraris, kiuj bonvolis antaŭdiri nian baldaŭan pereon!

La VIIa kongreso de Esperanto, en Antverpeno, ĉerpos el la raportoj farotaj al ĝi pri la universala kongreso de la rasoj novajn profitojn por nia agado en ĉiuj landoj. Jam la kongresa laboro estos influata per la nove gajnotaj spertoj. La Esperanta vivo fariĝos pli intensa, ol ĝi estis ĝis tiu ĉi jaro. Ni havos eble novajn batalojn, sed, se ni bone uzos niajn fortojn, ni atingos la celon.

W. MARCHAND.

## DE BRUSELO AL KAIRO

(BLINDULKONGRESO)

### I. Bruselo - Milano

Milano, la 9an de februaro 1911.

Mardon, je la 5a horo vespere, mi estis forlasonta la instituton por la longa vojaĝo; emociis min la lastaj manpremoj de miaj kunfratoj kaj lernantoj, la krioj: « bonan vojaĝon! sendu poŝtkartojn; alportu memoraĵojn el Jerusalemo, el Kairo! » k. c. Kaj baldaŭ mi estis sola kun servisto, kiu akompanis min por

porti mian valizon. Tute sola mi forveturis el Bruselo je la 6.35a horo vespere. Proksimume dudek belgajn kolegojn mi renkontos vendredon tagmeze en Brindisi. Se oni kunloĝadas en domo kun pli ol kvarcent kunloĝantoj amemaj, oni ege sentas la solecon. Tio ankaŭ okazis al mi dum la unuaj horoj, kaj ĝi naskis en mi iom malĝojigan pensadon. Post vesperpreĝo mi penadis dormi kaj, stranga neordinaraĵo, mi dormis tiun nokton pli ol kvindekfoje. Merkredon, je la 6a matene, mi estis en Bazelo, kaj intencis ne plu dormi, por ĝui la vidaĵojn de l'ŝvisaj montoj kaj valoj. Sed, ĉar kutimo estas kvazaŭ dua naturo, mi daŭrigis kontraŭvole dormi kaj vekigi mi nescias kiomfoje. Pri Svislando mi nur povas diri, ke ĝin tute kovras, de Bazelo ĝis la S-ta Gotarmonto, blanka neĝvesto; ke tiu ĉiama blankeco ŝajnis al mi tro funebra; ke pro tiu blankeco la urbo Lucerno kun sia belega lago ne sukcesis ravi min, kiel antaŭ du jaroj, kiam mi tie haltis revenante el Napoli. Sed, kiam mi eliris la tunelon de l'S-ta Gotarmonto, ridetis al mi la valo de l'Tizino jam iome verdiganta, la jam varmeta suno itala kaj la hela viviga printempo verŝis en min novan reviviĝon kaj dolĉan naturĝuadon. Ravaj estis por mi la lagoj de Lugano kaj de Komo; ravaj ankaŭ la montetoj kiuj ambaŭflanke randigas la valon, kaj kies neĝaj pintoj brilis en la sunradioj dum ilia subaĵo sin kovris jam per printempa verdaĵo.

Ĝuste je la 15.5a horo la vagonaro haltis en Milano, kie kvin samideanoj min atendis. Estis la esperantista konsulo, sinjoro Luciano Cattorini; grafoj Rinaldo kaj Petro Padulli; sinjoroj Karlo Monti kaj Ludoviko Anfosso. Ili akompanis min ĝis mia hotelo, kaj de tie, al la Milana blindulejo, kie mi ĝuis la feliĉon manpremi kun mia maljuna amiko pastro Vitalo, kiu de longaj jaroj estras tiun instituton, la ĉefan de Itallando. Mi vidis la blindulojn en lernejoj, laborejoj kaj muzikejoj. Ili ĝojis pro la vizito de la malproksima blindulprofesoro, kaj miaflanke mi estis feliĉa pro la retrovo de l'blindaj infanoj, en kiuj mi rimarkis la saman afablan spiriton kiel en miaj propraj lernantoj. Bedaŭrinde, mi ne povis multe paroli kun ili: al « Bongiorno, signore », mi nur povis respondi « Bongiorno, amici. » Tamen, en la supera kurso, mi trovis lernanton esperantistan, nur unu. Li tuj fariĝis mia interpretanto, kaj ni parolis pri la celo de mia vojaĝo, pri la blinduloj Woluwaj kaj Milanaj; mi sciigis, ke antaŭ tri jaroj oni faris en la instituto Esperantan kurson, sed ke oni ĝin ne longe daŭrigis. Post nia interparolado kun mia interpretanto, tute tradukita al la lernantoj, la infanoj petis la direktoron por havi denove esperantan kurson, kaj la maljuna pastro, kun patra rideto, promesis, ke de nun oni rekomencos la instruadon.

Hodiaŭ, jaŭdon, je la 9a horo matene, la esperantistoj revenis min preni en mia hotelo: ni trapromenadis la ĉefajn stratojn de la urbo, kaj ĉeestis en la katedralo diservon

kantatan de la Episkopo. Mi revenis en la hotelon je la 12a (tagmeze), rapide priskribis la unuan parton de mia vojaĝo, kaj nun, mi devas min prepari por daŭrigi ĝin ĉar je la 3,40 (15,40) a horo, mi forveturos al Brindisi, kie min atendos miaj belgaj kolegoj.

Kun kora saluto al miaj belgaj samideanoj!

FRATO IZIDORO.

---

## VENUSO

(Soneto)

Vi estas planedo mirinda, ho stelo!  
Matene vi brilas, ĉar, dia orfloro,  
Vi estas filino de l' dolĉa Aŭroro  
Kaj la plej radia ĉiela juvelo.

La bona paŝtisto — de l' monto l' angelo —  
Vi ĉiam admiras kun granda fervoro,  
Kaj lia kanteto je via honoro,  
Vespere forflugas al vasta ĉielo.

Kaj, kiam la nokton vi venas ornamu,  
Ho! kiel paŝtisto, mi volas vin ami,  
Revante pri via profunda mistero;

Ĉar mia poeta animo sentema  
Dezirus ekdormi post lasta vespero  
En via eterna lumego pacema.

ELÉONORE CHEVALIER.

---

## NEKROLOGIO PROFESORO CH. MÉRAY

La 2an de februaro mortis en Dijono S-ro CH. MÉRAY, eks-profesoro de la tiea universitato kaj korespondanto de la Franca Instituto.

El la vivo de la bedaŭrata mortinto ni resumas, laŭ la nekrologia artikolo de S-ro rektoro Boirac (marta numero de *La Revuo*) la jenajn detalojn:

S-ro Méray, jam tre famkonata de ĉiuj matematikistoj, kiel aŭtoro de tute originala traktato pri infinitezimala analizo kaj, elpensinto de nova metodo por la instruado de geometrio, kontaktiĝis kun Esperanto en 1900. Potence interesita de la simpleco, facileco kaj internacieco de la kreaĵo de D-ro Zamenhof, li sin jetis senhezite en la bataladon por diskonigi Esperanton en ĉiuj sciencaj rondoj. Multaj kleraloj fariĝis kateĥumenoj de tiu granda apostolo. En Dijono mem li okupis la publikan opinion pri Esperanto dum tuta jaro, akirante al la ideo la aliĝon de la

tuta urba eminentularo. En la komenco de 1901, li fondis la esperantistan grupon de Dijono kaj organizis, sub la patronado de la « Turing-Klubo » la unuan kurson de Esperanto. Ĝis la fino de sia vivo li daŭrigis sian propagandan agadon kaj la energian bataladon kontraŭ la perfidaĵoj de niaj kontraŭuloj.

Honoron kaj dankon al la memoro de tiu kuraĝa kaj sindona pioniro!

J. W. VAN DER WAL

Kun sincera bedaŭro ni eksciis la morton de S-ro J. W. VAN DER WAL, vic-pastro de la paroĥo S-ta Vilebrordo en Hago, unu el niaj plej simpatiaj kaj fervoraj nederlandaj samideanoj.

Li speciale sin dediĉis al la propagando inter la nederlandaj katolikoj kaj ageme kunlaboris al ilia organo *Nederlanda Katoliko*.

Apenaŭ 35jara, do en la plena florado de sia vivo, li estas forrabita el niaj vicoj. Lia morto estas por niaj nederlandaj amikoj grava perdo, kiun nuntempe oni malfacile povos ripari.

Li ripozu en paco!

---

## HUMORAĴOJ (1)

KOMPLEZA GVIDISTO

*Gvidisto*. — Ĉi tie, gesinjoroj, okazis la juro sur la Rütli.

*Sinjoro*. — Permesu, gvidisto. La loko troviĝas je du horoj pli fore. Vi ja montris ĝin al mi antaŭ du jaroj, kiam mi estis sola.

*Gvidisto*. — Ĝuste, sed mi pensis, ke ĝi estas tro malproksima por sinjorino via edzino.

SKALO DE ĜENTILECO ĈE LA  
FERVOJAJ KONDUKTOROJ

*Unua klaso*. — Mi petas la gemoŝtojn, ke ili komplezu eniri.

*Dua klaso*. — Gesinjoroj, eniru, mi petas.

*Tria klaso*. — Eniru rapide, la vagonaro tuj foriros.

*Kvara klaso*. — Nu, vi senzorgaj brutoj, sakramento! ĉu vi baldaŭ eniros la vagonaron?!

MALKOMPREENAĴO

*Edzino*. — Kara Ernesto, nia nova kuirstino estas diligenta kaj bonvola, sed ankoraŭ malmulte lerta; la rostajon ŝi domage bruldifektis, sed kiel kompensajon vi recevos kison.

(1) Ĉiuj ekstraktitaj el *La Spritulo*, internacia monata gazeto por serĉo, humoro kaj satiro.

*La Spritulo* estas tre leginda, bele ilustrita revuo; la ĉiujara abonprezo estas 3 frankoj = Sm. 1.200. Ĉefredaktoro: **Richard Bresch**, Tolkewitzerstrasse, 20<sup>t</sup>, Dresden-Blasewitz (Germanujo).

Edzo. — Bone, enirigu ŝin.

### EN HEBREUJO

Greko kaj hebreo disputis pri la antikveco de civilizacio en siaj nacioj. La greko fanfaronante diris :

— Miaj praavoj estis tre civilizitaj ; kiam oni esplorfosis en Akropolo, oni trovis metalladenon. Tio pravas, ke ili konis la uzadon de la telegrafo.

La hebreo rediris : He, kiam oni esplorfosis sub la salomona templo, oni trovis nenion.

— Kion do tio pravas ?

— Ke *miaj* praavoj konis la uzadon de la senmetala telegrafo.

## PROBLEMOJ<sup>(1)</sup>

16.

### Ambulanca kruco

FIGURO

Nia planedo — radiko de maleniri — anagramo de plen — sciigis per telegramo — trouzo de la elegio (radiko) — kiu meritas riproĉon — plibeligitaj — faranto sen aro — kiu meritas — montras, ke aferoj apartenas al ia subjekto.

17. — **Kunmiksaĵo.** — Tiujn ci pecojn da vortoj konvene ordigu, kaj vi legos frazon el la *Ekzercaro* de la *Fundamento* : jnk — bas — kasl — tra — ibro — rojn — ple skri — ver — ns — sim — isto — pe — krib — verk — ajs — pa — isto.

18. — **Kriptografio aŭ sekretilitera skribado.** — Pd — chsat — dpeptcdz — gldr — dp — uphm — dpadm — zbuŭtm — abah — zdrh — pd — hscit.

CLŬILPLT.

## DIVERSAJ INFORMOJ

**ALVOKO.** — Okaze de la internacia ekspozicio de Norda Francujo, malfermigonta en Roubaix dum la nuna monato, la grupo esperantista de Roubaix-Tourcoing havos specialan fakon, rezervitan al Esperanto.

Ĉiuj esperantistoj estas petataj helpi al niaj ticiaj amikoj sendante al ili senprokraste ĉiujn esperantajn librojn, katalogojn, leterojn, kartojn, etiketojn, ktp. kiujn ili povas disponi. Adreso : Al S-ro Ch. Dorion, prezidanto de la

(1) Oni sendu la solvojn, antaŭ la 25a de majo 1911, al S-ro FRANS SCHOORS, sekretario de la Redakcio, 45, kleine Beerstraat, Antwerpen, (45, rue de la Petite Ourse, Anvers). Prefere skribitajn sur poŝta karto.

En la lasta numero de la 3a jarkolekto estos publikigataj la nomoj de la solvintoj. Oni povas respondi pseŭdonime.

Belaj premioj estos aljuĝataj.

grupo esperantista Roubaix-Tourcoing, 46, rue des Fabricants, Roubaix (France).

— Sama deziro estas esprimita de la organizantoj de la VĽa germana Esperanto-kongreso, okazanta en Lübeck, 3-9 de junio 1911. Ĉiujn sendaĵojn oni adresu al S-ro D-ro Möbusz, prezidanto, Falkenstrasse, 12, Lübeck, Deutschland.

— Deziras korespondi :

Jean Leurat, 4, rue Bertin Pouce. Paris ;

G. O. Crawby, 53, Bodenstreet, Nottingham (Anglujo) ;

Arnold van Praag, 391, Vrolikstraat, Amsterdam ;

Jan Barta, soldato en inf. reg. 91, Komp. 14 en České Budějovice (Bohemujo) ;

Josef Kieweg, serĝento en inf. reg. 91, Komp. 14, » »

Bohuslav Stastny, » » » »

Frantisek Vysin, » » » »

Carl Koopmann, 91, Brüderstr., Münster i/W (Deutschland) ;

Otto Geier, C. G., Hoffmannstr., 243, Neugersdorf (Saksujo), kun gekongresanoj el ĉiuj landoj kaj precipe kun Antverpenaj ge amideanoj ;

F-ino Elfriede Möchel, 261, Mathildenstrasse, Dresden A. (Saksujo), kun Antverpena samideano ;

Manuel Maynar Barnolas, Abogado, Cerdan 19 Pral, Zaragoza (Hispanujo) ;

F. G. Rowe, 51, Portland Road, Nottingham (Anglujo) ; ŝatas skribi unufoje ĉiumonate, aŭ ludi ŝakludon per poŝtkartoj ;

Siegmund Freund, 50, Moritzstr., Breslau (Germanujo) ; pri politiko aŭ generale pri sciencoj.

— Prezidanto de grupo deziras korespondadi kun Antverpena fraŭlino ĉirkaŭ 22jara. Li kaj la grupano intencas ĉeesti la 7an. Oni bonvolu respondi al S-ro Rogers, 20, Cemetery Road, East Kirby, Notts. (Anglujo).

— **Granda sukceso en ĉiuj kongresoj.** Esperantajoj el verdstclumita silkajo ; oficialaj flagetoj, kravatoj por sinjoroj ; rubandoj kaj vualskarpoj por sinjorinoj. Aĉeteblaj ĉe B. PEYRAUD, vic. del. U. E. A., 54, rue de la Préfecture, St-Etienne (France).

Kontraŭ respondkupono oni ricevas donacon kaj la ilustritan prezaron.

La firmo serĉas seriozan belgan esperantiston por vendi tiujn artikolojn antaŭ kaj dum la Antverpena kongreso.

## BELGA KRONIKO

*Ni insiste petas ĉiujn grupojn kaj ankaŭ la izolilajn samideanojn, ke ili sendu, kiel eble plej akurate, informojn pri sia societo aŭ ĉiuspecajn sciigojn pri Esperanto, plej malfruc la 25an de ĉiu monato, al la Direktoro de « Belga Esperantisto », 25, Arendstraat (rue de l'Aigle), Antwerpen (Anvers). Tre dankeme nia redakcio ankaŭ ricevos la jurnalajn, enhavantajn artikolojn pri nia movado.*

**ANTVERPENO.** — **Avizo** Por povi pruntepreni esperantajn librojn en la Popola Biblioteko (Blindenstraat, rue des Aveugles) sufiĉas ke oni havu ateston de S-ro Van der Biest-Andelhof, direktoro de B. E.

— Diversaj librovendistojde Antverpeno elmetas esperantajn librojn ĉe siaj montrafenestroj. Citataj estu : *Boekhandel Flandria*, Katelijne vest, (Rempart St Cathérine), *De Presse*, 11, Annessensstraat (rue Annessens), *Nederlandsche Boekhandel*, 50 St Jacobsmarkt (marché St Jacques), *Roelants* 4, St Pietersstraat (rue St Pierre). Estas konsilinde, ke por mendi Esperantajn librojn, oni sin turni al tiuj libroventistoj, kiuj kutimas ilin daŭre elmeti.

**La Verda Stelo.** — La membroj estas petataj ĉeesti la monatan ĝeneralan kunvenon, kiu okazos merkredon, la 20an de aprilo, je la 8 1/2a vespere, en la kafejo « Zomerhof », Dageraadplaats, 30. TAGORDO : 1. Raporto pri la antaŭa kunsido. — 2. Nova kurso. — 3. La 3a belga kongreso. — 4. La 7a internacia kongreso. — 5. Diversaj informoj. — 6. Parolado de S-ro Fillet : *produktmaniero de malvarmo kaj glacio*.

Ciumerkredo, je la 9a vespere, okazas en la kunvenejo konversacia kunsido, kiun ĉiuj membroj estas petataj ĉeesti.

**Suda Lumo.** — La 23 an de februaro tiu agema societo malfermis kurson, gvidatan de S-ro Prof. Jacobs, kaj kiu sukcesplene progresas.

Perfektiga instruado regule okazas ĉiujarde je la 8 1/2a vespere en la sidejo de « Suda Lumo », *Distillerie du Cirque*, Placo Leopold de Wael. Post legadoj kaj interparoladoj la grupanoj lernas Esperantajn kantojn.

**LIEĜO.** — La anoj de la tri esperantistaj grupoj kunvenis la 13 an de februaro kaj decidis kunigi en unu societo, kiu alprenis la nomon de *Lieĝa Esperantista Grupo* kaj kunmetis jene sian estraron :

Prezidanto : S-ro Kolonelo de Troyer ;

Vic-prezidanto : S-ro S. Vatriquant ;

Sekretario : S-ro Relavisse ;

Kasisto : S-ro Lanser.

Kurso estas organizita en kiu partoprenas regule 40 lernantoj. La instruado estas farata de S-ro Vatriquant, en la Universitato. Al la Lieĝa grupo aliĝis S-ro K. Schriewer el Neŭtrala-Moresnet, kiu nuntempe deĵoras kiel soldato en Lieĝo kaj kiu ageme kunlaboros por sukcesigi la novan organizon.

La lieĝanoj esperas, ke post kelkaj semajnoj la movado estos sufiĉe grava en sia urbo, por inde akcepti la anojn de la 7a kongreso kiam ili tie haltos, dum la postkongresa ekskurso.

**VERVIERS — Esperantista Grupo.** — La 19 an de februaro tiu vigla societo organizis tre sukcesintan feston kun kantoj kaj deklamadoj ; oni i. a. prezentis la spiritplanan komedieton *Amours Esperantistes* de D-ro W. Van der Biest.

Dum siaj kunvenoj la anoj de la grupo sin okupas pri la esperantigo de francaj verketoj. Jen tre bona kaj utila ekzerco, kiu estas ĝenerale ŝatata.

## Het Esperanto in den Vreemde

**BRAZILIË** — Het 4<sup>de</sup> Braziliaansche congres van Esperanto zal van den 21 tot den 24 April te Juniz de Fora plaats hebben. Merkwaardig is het feit, dat de burgemeester der stad het voorzitterschap van dit congres zal bekleeden en de debatten in het Esperanto zal leiden.

— Onder het opschrift « Mededeelingen aan het Publiek » zijn in de telegraafbureellen van Brazilië plakaten voorhanden in het Portugeesch, Engelsch, Fransch, Duitsch en Esperanto.

**DUITSCHLAND.** — Onder de steden, waar Esperanto op het leerprogramma der openbare scholen voorkomt, mag thans ook Hannover genoemd worden, waar onze taal toegelaten wordt in al de volksscholen, alsmede Munster i/W, waar meer dan dertig leerlingen der hoogere reaal-

## L'Esperanto à l'Étranger

**BRESIL.** — Le 4<sup>me</sup> congrès brésilien d'Esperanto aura lieu du 21 au 24 avril à Juniz de Fora. Il est digne de remarque que le bourgmestre de la ville occupera la présidence de ce congrès et qu'il conduira les débats en Esperanto.

— Sous le titre « Informations pour le public » on peut lire dans tous les bureaux télégraphiques du Brésil des affiches en portugais, anglais, français, allemand et Esperanto.

**ALLEMAGNE.** — Parmi les villes où l'Esperanto figure sur le programme des écoles publiques, on peut dès maintenant citer Hanovre, où notre langue est acceptée dans toutes les écoles primaires, ainsi que Munster en W, où plus de trente élèves de l'école réelle suivent un cours d'Espe-

school eenen leergang volgen. Verheugend is het overigens te mogen bestatigen dat Esperanto meer en meer belangstelling in de onderwijzerswereld verwekt : de hr Behrendt hield onlangs eene voordracht over onze zaak in de onderwijzersvereniging te Berlijn-Rixdorf ; de hr Wichert sprak over het zelfde onderwerp in de onderwijzersvereniging te Berlijn-Weissensee ; te Delitzsch stelt zich de hr hoofdonderwijzer Schmiedeberg als ijverig propagandist aan ; te Deuben gelukte de hr Siegel er in vele onderwijzers aan te werven ; te Leisnig worden lessen van Esperanto gegeven door de hh. Drs Heller en Jäger, hoofdonderwijzers bij de realschool ; te Zittau eindelijk, richtte de hr Semich eenen leergang voor de onderwijzers en onderwijzeressen der streek in.

— Nieuwe leergangen werden geopend en groepen gesticht te Berlijn, Charlottenburg, Delitzsch, Düsseldorf, Gleiwitz, Göttingen, Hamburg, Hof i/B, Kassel, Königsberg, Kottbus, Krefeld, Leobschütz en Munster i/W. In deze laatste stad maakte de hr trompetter Blasing een doelmatige propaganda in zijn regiment ; hij gelukte er in eenen cursus in te richten, die door 15 onderofficieren gevolgd wordt.

— Bij de Silesische *Gewerbe-Ausstellung*, welke dit jaar te Schweidnitz zal plaats hebben, wordt een bijzonder vak aan Esperanto voorbehouden.

— Om het Esperanto bij het praktische leven in te voeren werd onlangs te Potsdam eene maatschappij ingericht, die voor doel heeft het vreemdelingenverkeer te bevorderen, en waarvan de hr Vosberg, eerste burgemeester der stad en lid van het Eeerenhuis, het voorzitterschap aanvaard heeft.

— Naar het voorbeeld der *Deutsche Warte* zal voortaan de *Tägliche Rundschau für Schlesien und Posen* wekelijks een « Sileza dimanĉ-angulo por Esperanto » bevatten.

— Het congres van den Rijnlandschen bond zal waarschijnlijk, in Mei, te Godesberg plaats hebben ; een sierlijk gidsboek (met korten inhoud in Esperanto) van dit lieve stadje is onlangs verschenen.

**FRANKRIJK.** — De federatie van het Rhône-gebied zal op 22-23 April een congres houden, waarvan veel goeds verwacht wordt, namelijk de stichting van een algemeenen Franschen bond.

— De handelskamers van Abbeville, Arras, La Rochelle, Laval, Le Puy en Rennes gebruiken onze taal in hunne briefwisseling ; sommige ondersteunen geldelijk de plaatselijke groepen. Op 52 Fransche handelskamers verklaren er zich 51 gunstig aan Esperanto.

ranto. On constate du reste avec plaisir que l'Esperanto éveille de plus en plus l'intérêt du personnel enseignant ; M. Behrendt a fait récemment une conférence sur notre cause au cercle d'instituteurs de Berlin-Rixdorf ; M. Wichert a parlé sur le même sujet dans la société d'instituteurs de Berlin-Weissensee ; à Delitzsch une propagande très active est menée par M. l'instituteur en chef Schmiedeberg ; à Deuben M. Siegel a réussi de rallier un grand nombre d'instituteurs ; à Leisnig des leçons d'Esperanto sont données par M. M. les Drs Heller et Jäger, instituteurs en chef de l'école reale, enfin à Zittau M. Semich a organisé un cours pour les instituteurs et les institutrices de la région.

— De nouveaux groupes ont été fondés et des cours ont été organisés à Berlin, Charlottenburg, Delitzsch, Düsseldorf, Gleiwitz, Göttingue, Hamburg, Hof e/B, Cassel, Königsberg, Kottbus, Krefeld, Leobschütz et Munster e/W. Dans cette dernière ville M. le trompette Blasing a fait une propagande efficace dans son régiment ; il a réussi d'ouvrir un cours, qui est suivi par 18 sous-officiers.

— A la *Gewerbe-Ausstellung* (exposition industrielle) de Silésie, qui aura lieu cette année à Schweidnitz, un compartiment spécial sera réservé à l'Esperanto.

— Pour introduire l'Esperanto dans la vie pratique, on a récemment établi à Potsdam une société, dans le but de favoriser les relations des étrangers, et dont M. Vosberg, premier bourgmestre de la ville et membre de la Chambre des Seigneurs, a accepté la présidence.

— D'après l'exemple de la *Deutsche Warte*, la *Tägliche Rundschau für Schlesien und Posen* publiera hebdomadairement un « Sileza dimanĉ-angulo por Esperanto ».

— La congrès de la ligue rhénane se tiendra à Godesberg, probablement en mai prochain. Un élégant livre-guide (avec résumé en Esperanto) de la charmante petite ville a paru ces derniers jours.

**FRANCE.** — La fédération rhodanienne tiendra le 22-23 avril un congres, dont on attend beaucoup de bien, notamment la fondation d'une ligue générale française.

— Les chambres de commerce d'Abbeville, Arras, La Rochelle, Laval, Le Puy et Rennes emploient notre langue pour leur correspondance ; plusieurs chambres soutiennent financièrement les groupes locaux. Sur 52 chambres de commerce françaises 51 sont favorables à l'Esperanto.

— *L'Expansion Commerciale, l'Aéro* en *Le Bulletin des institutrices et des instituteurs de la Savoie* bevatten regelmatig rubrieken in Esperanto.

— De gidsboeken over Parijs, die de maatschappij « les Amis de Paris » eerlang zal uitgeven, zullen ook in Esperanto verschijnen; eveneens gebruikt het *Laboratoire Central d'électricité* Esperanto voor zijne publiciteit.

**ITALIË.** — Bij het 6<sup>o</sup> Blindencongres, onlangs te Bologna gehouden, werd eenstemmig de facultatieve invoering van het onderwijs in Esperanto aangenomen. Leergangen voor blinden werden ingericht te Bologna, Padua, Reggio en Emilo; weldra zal dit voorbeeld gevolgd worden door de instituten van Napels, Palermo en Genua.

**MEXIKO.** — Te Mazatlan werd onlangs de esperantische groep « Semo » gesticht; het dagblad *El Correo de la Tarde* dezer stad heeft aangenomen propaganda-artikels en nota's over Esperanto op te nemen.

— Esperanto is sedert lang in gebruik bij het observatorium van het instituut Juárez, te Durango.

**NEDERLAND.** — De leden der vier Haagsche groepen hebben onlangs tot den gemeenteraad hunner stad een verzoekschrift gericht, vergezeld van een uitvoerig verslag van toelichting, met het doel Esperanto bij de gemeentelijke handelsleergangen ingelascht te krijgen. De hr. wethouder (schepen) van openbaar onderwijs heeft met veel belangstelling kennis genomen van de vorderingen, die Esperanto reeds in de onderwijs-wereld gemaakt heeft.

Goede kans!

— De burgemeester van den Haag heeft toegelaten dat de agenten van politie, wier bekwaamheid door een examen zal bewezen zijn, de groene ster als herkenningsteeken zullen mogen dragen.

— De in den Haag verschijnende *Avondpost*, een der voornaamste dagbladen van Nederland, zal voortaan alle Zaterdagen eene « Esperanto-rubriek opnemen, bezorgd door den hr. L. J. Bruijn, en bevattende nevens eenen leergang van Esperanto, eene reeks letterkundige stukken.

In hetzelfde dagblad geeft geeft Mej. Nella Boon regelmatig mededeelingen over de esperantische beweging.

**OOSTENRIJK-HONGARIË.** — Te Prostejov wordt bij de Handelsakademie onderwijs in Esperanto gegeven aan 72 studenten van beide geslachten.

— Al de beambten van de rationale verzekeringsmaatschappij « Balkan », te Zagreb, zijn het Esperanto machtig.

— *L'Expansion Commerciale, l'Aéro* et *le Bulletin des institutrices et instituteurs de Savoie* contiennent régulièrement des rubriques en Esperanto.

— Les livres-guide de Paris, qui seront publiés bientôt par la société « les Amis de Paris », paraîtront aussi avec un texte en Esperanto; le *Laboratoire Central d'électricité* emploie également l'Esperanto pour sa publicité.

— **ITALIË.** — Le 6<sup>o</sup> congrès des aveugles, tenu il y a quelque temps à Bologne, a adopté à l'unanimité l'introduction facultative de l'Esperanto. Des cours pour aveugles ont été organisés à Bologne, Padoue, Reggio et Emilo; bientôt cet exemple sera suivi par les instituts de Naples, Palerme et Gènes.

**MEXIQUE.** — A Mazatlan fut fondé dernièrement le groupe espérantiste « Semo »; le journal *El Correo de la Tarde* de cette ville a accepté la publication d'articles de propagande et de notes en Esperanto.

— Depuis longtemps l'Esperanto est employé à l'observatoire de l'institut Juárez, à Durango.

**PAYS-BAS.** — Les membres des quatre groupes de La Haye viennent d'adresser à l'administration communale de leur ville une requête, accompagnée d'un mémoire explicatif, dans le but de faire inscrire l'Esperanto sur le programme des cours commerciaux. M. l'Échevin de l'Instruction Publique, s'est vivement intéressé aux progrès que l'Esperanto a déjà faits dans le domaine de l'enseignement.

Bonne chance!

— Le bourgmestre de la Haye a autorisé les agents de police, dont la capacité sera prouvée par un examen, à porter l'étoile verte comme signe distinctif.

— Le journal *De Avondpost*, qui paraît à la Haye et qui jouit d'une grande vogue chez nos voisins du Nord, insère dès maintenant tous les samedis une rubrique espérantiste, due à M. J. L. Bruijn; celle-ci se compose d'un cours d'Esperanto et d'une série de morceaux littéraires.

Le même journal publie régulièrement des communications faites par M<sup>lle</sup> Nella Boon, et qui se rapportent au mouvement espérantiste.

**AUTRICHE-HONGRIË.** — Dans la ville de Prostejov l'Esperanto est enseigné à l'université commerciale à 72 étudiants des deux sexes.

— Tous les employés de la société nationale d'assurances sur la vie « Balkan », à Zagreb, possèdent l'Esperanto.

**RUSLAND.** — Te Nijni-Novgorod is eene esperantische maatschappij in vorming; te Derbent werd een belangrijke groep gesticht, die prins Tavgiritsë tot voorzitter heeft. De beweging gaat goed vooruit te Baku, Kronstadt, Vladivostok en Tomsk.

**SPANJE.** — Regelmatig verschijnen rubrieken in Esperanto in *La Publicidad* (Barcelona), *Voc Nou* (Reus) en *Diario de Villanueva*.

— Te Cordoba en te Madrid wordt Esperanto in de gestichten voor Blinden onderwezen.

— Het onderwijs in Esperanto bij de krijgsscholen en in de academie voor militaire geneesheeren wordt met het beste gevolg voortgezet.

— De esperantische politieagenten van Barcelona hebben de toelating gekregen de groene ster te dragen.

**VEREENIGD - RIJK.** — Esperanto verspreidt zich meer en meer bij het spoorwegbeheer. Onlangs riep een omzendbrief van den hr. minister van Spoorwegen in Oostenrijk de aandacht van zijn personeel op het nut van Esperanto voor het internationaal verkeer; in het Februari-nummer van B. E. werd de stichting van den internationalen bond der spoorwegbeambten gemeld; thans zien wij dat in Engeland de *North-Eastern Railway* berichten in Esperanto laat drukken. Voorwaar, wij komen volop in de periode der praktische benutting van onze taal.

— Ook de ontwikkeling van het Esperanto bij het openbaar onderwijs gaat in het Vereenigd-Rijk goed vooruit. De *Northern Polytechnic* te Holloway heeft het Esperanto in zijn leerplan opgenomen; te Bolton wordt onze taal onderwezen bij de school van den tweeden graad in Moorstreet; eveneens te Warrington, Leith, Reading en Torquay (Boy Scouts) ontvangen de leerlingen onderwijs in onze taal. Een leergang werd geopend bij de stedelijke technische school te Widnes.

**VEREENIGDE STATEN.** — Te Pittsburg werd onlangs, ten titel van proef, bij de *East Liberty Academy* Esperanto verplichtend ingevoerd; bij de universiteit dier stad wordt onze taal insgelijks onderwezen.

— *Amerika Esperantisto* bevestigd, dat sedert het congres van Washington de esperantische beweging in zoover toegenomen is, dat genoemd tijdschrift reeds meer dan 10.000 aanvragen naar leerboeken van Esperanto heeft ontvangen.

— Te Matanzas (Cuba) heeft het blad *El Fanal* zijne kolommen voor Esperanto geopend.

**RUSSIË.** — A Nijni-Novgorod une société espérantiste est en formation; un groupe important a été fondé à Derbent sous la présidence du comte Tavgiritsë. Le mouvement est en grand progrès à Bakou, Cronstadt, Vladivostok et Tomsk.

**ESPAGNE.** — Des rubriques en Esperanto paraissent régulièrement dans *La Publicidad* (Barcelone), *Voc Nou* (Reus) et le *Diario de Villanueva*.

— A Cordoue et à Madrid l'Esperanto est enseigné dans les instituts pour aveugles.

— L'enseignement de l'Esperanto à l'école militaire et à l'académie pour médecins militaires se continue avec le meilleur succès.

— Les agents de police espérantistes de Barcelone ont reçu l'autorisation de porter l'étoile verte.

**ROYAUME-UNI.** — L'Esperanto se propage de plus en plus dans l'administration des chemins de fer. Une circulaire récente du ministre des chemins de fer d'Autriche a appelé l'attention de son personnel sur l'utilité de l'Esperanto pour les relations internationales; le numéro de février de B. E. mentionne la fondation de la ligue internationale des employés des chemins de fer; à présent nous voyons qu'en Angleterre le *North-Eastern Railway* fait imprimer des avis en Esperanto. Vraiment, nous arrivons en plein dans l'application pratique de notre langue.

— Le développement de l'Esperanto s'annonce bien dans le Royaume-Uni. Le *Northern Polytechnic* à Holloway a accepté l'Esperanto dans son programme scolaire; à Bolton, l'Esperanto est enseigné dans l'école secondaire de Moorsireet; de même à Warrington, Leith, Reading et Torquay (Boy Scouts) on enseigne notre langue aux élèves. Un cours vient d'être ouvert à l'école technique de la ville de Widnes.

**ETATS-UNIS.** — A Pittsburg on a introduit, à titre d'essai, un cours d'Esperanto à la *East Liberty Academy*; on enseigne également notre langue à l'université de cette ville.

— *Amerika Esperantisto* constate que depuis le congrès de Washington le mouvement espérantiste à tellement progressé, que cette revue a déjà reçu plus de 10.000 demandes de manuels d'Esperanto.

— A Matanzas (Cuba) le journal *El Fanal* a ouvert ses colonnes à l'Esperanto.



Greno, greno, ĉiam greno. Ne nur lia specimenĉambro sed lia skribotablo, liaj ŝrankoj kaj tabuletoj estis superŝutitaj per ĝi ; la greno estis dissemita tra lia ĉambro ; ĝis en lia kuŝejo oni trovis grenon. Kiam li elpoŝigis sian naztukon, la greno ekpluvis ; kiam li forprenis sian ĉapelon, la greneroj falis el la ĉapelbordoj, kaj la servistino, kiu brosis liajn ŝuojn, kutimis zorge skui ĉiun ŝuon antaŭ ol meti la manon en ĝin kaj ekbrosi. Ĉu do estas mirige, ke ankaŭ en lia kapo restis loko nur por greno ? Lia malgrasa, seka, pergamena vizaĝo estis por la komercistoj, kiuj kun li interrilatis, pli bona sciigilo ol ĉiaj eblaj komercaj telegramoj kaj borsaj avizoj. Sur lia vizaĝo, ĉia plikariĝo aŭ malplikariĝo estis legebla kvazaŭ nigre surblanke ; efektive, lia pinta mentono iris supren aŭ malsupren laŭ la greno, kaj mallongigis aŭ plilongigis lian vizaĝon, tiel farante ĝin pli aŭ malpli severa, ĉar serioze streĉita ĝi restis ĉiam.

Kaj tamen, tiu homo estis ankoraŭ en la floreco de la jaroj, en la tempo kiun la aliaj homoj uzas por la plezuroj, por nehaltigebla ĉaso al diversaj kontentiĝoj kaj vanaĵoj. Li estis apenaŭ tridekjara. Sed, de liaj plejjunaj jaroj, la greno senigis lin je ĉia vivoĝojo. Li estis unu el tiuj homoj, kiuj povas vivi nur por unu afero, kies spiritakreco ne estas sufiĉe forta por atingi larĝan horizonton ; li konis nur unu aferon : Greno, greno. Tiu viro sin trovis do en la ĉambro kaj pripensadis. Kaj tiufoje ne pri greno li pensis ; li pensis pri virino ! Pri virino, jes ! Li estis edziĝonta, li devis edziĝi, li ne povis fari alie.

Antaŭ kelkaj monatoj lia patrino estis mortinta. Kiam ŝi sentis ke la fino alproksimiĝas, ŝi alvokis sian filon kaj diris al li

« Antono, mia filo, mi baldaŭ lasos vin sola, sed aŭskultu mian konsilon kaj sekvu ĝin. Ne lasu ekspluati vin de fremduloj : via nescieco pri mastrajaj aferoj povos kaŭzi tro da malprofito al vi. Serĉu seriozan, fervoran edzinon, ne tro junan, ne tro superegan al via rango ; virinon, kiu okupas sin tute pri sia mastrajo. En la trovo de tia virino, mia filo, estos por vi la feliĉo. »

Kaj Holdings, kiel bona filo, akceptis la patrinan konsilon, kaj nun li estis baldaŭ plenumonta ŝian deziron. Unue li ne sciis kiel entrepreni la aferon. Li ja renkontis tie aŭ tie ĉi fraŭlinojn kiuj ŝajnis plenumi ĉiajn postulojn, sed kiamaniere akiri certecon ? Holdings, kiel ĉiu honesta komercisto, ne ŝatis spekulaciojn. Edziĝi kun iu ajn, je l'trafo, tio tute ne allogis lin. Cetere, li estis timema rilate al la virinoj. Li ne sciis, kiel alproksimiĝi al ili, kiel ekinterilati. Tio estis malagrable tempo por Holdings : por la unua fojo vekigis en li la konscio ke ekzistas en la mondo io alia krom greno.

El « De familie Schrikkel »  
esperantigis

O. VAN SCHOOR.